



# Praktika Lernolibro de Esperanto

実用エスペラント  
入門

belmonto

## はじめに

---

この本は、著者が1972-1973年ころに試作した、エスペラント講習用テキストです。

当時ほとんどなかった絵を多用する試みでした。タイプうちをして、きれいに作ろうとしていました。

ところが当時、急に鹿児島市民講座用のテキストを作ることになり、その結果、もっとやさしい入門用の *sistema lernolibro de esperanto*(公開済み)が生まれました。そのあおりをくらって、この本の試みは中断してしまい、今日までそのままになっています。

ほんの3課程の内容ですが、上のテキストと比較すると、かなり会話を重視していることがわかります。みなさまの何らかの参考になれば幸いです。



XXXXXXXXXXXX L E C I O N O 1 ( U N U ) XXXXXXXXXXXXXXX

Takeŝi : Bonan tagon!  
 Johano : Bonan tagon!  
 Takeŝi : Kiu vi estas?  
 Johano : Mi estas Johano, Johano ŜVARC.  
 Kaj, kiu vi estas?  
 Takeŝi : Mi estas Takeŝi, UEDA Takeŝi.  
 Kaj, Johano, kio vi estas?  
 Johano : Mi estas studento.  
 Mi apartenas al Kagoŝima-Universitato.  
 Kaj, kio vi estas?  
 Takeŝi : Ankaŭ mi estas studento.  
 Mi apartenas al Kumamoto-Universitato.  
 Johano : Mi apartenas al Kagoŝima-Universitato,  
 kaj vi apartenas al Kumamoto-Universitato.  
 Takeŝi : Jen venas Akiko, mia amikino!  
 Ankaŭ ŝi apartenas al Kumamoto-Universitato.  
 Haloo, Akiko!  
 Akiko : Haloo, Takeŝi!  
 Takeŝi : Akiko, jen estas Johano.  
 Johano : Bonan tagon! Mi estas Johano ŜVARC.  
 Akiko : Bonan tagon! Mi estas NAGATA Akiko.

XXXXXXXXXXXXXXXX V O R T A R O XXXXXXXXXXXXXXXXXXX




Bonan tagon. kiu vi est/as mi kaj kio student/o  
 aparten/as al universitat/o ankaŭ jen ven/as  
 mi/a amik/in/o (amik/o) ŝi student/in/o haloo

XXXXXXXXXXXXXXXX A L F A B E T O XXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Aa Bb Cc Ĉĉ Dd Ee Ff Gg Ĝĝ Hh Ĥĥ Ii Jj Ĵĵ  
 Kk Ll Mm Nn Oo Pp Rr Ss Ŝŝ Tt Uu Ŭŭ Vv Zz  
 a bo co ĉo do e fo go ĝo ho ĥo i jo ĵo  
 ko lo mo no o po ro so ŝo to u ŭo vo zo



|    |    |    |     |     |     |
|----|----|----|-----|-----|-----|
|    | 1  | 2  | 3   |     |     |
| 1  | mi | vi | li  | ŝi  | ĝi  |
| 2' | ni | vi | ili | ili | ili |



- GRAMATIKO -

( 1 ) -O

tag/o  
amik/o

universitat/o  
knab/o

student/o  
pom/●

( 2 ) -IN-

knab/o  
student/o  
amik/o

- - - knab/in/o  
- - - student/in/o  
- - - amik/in/o

( 3 ) -IST-

labor/ist/o  
kurac/ist/o

- - - labor/i  
- - - kurac/i

( 4 ) -AS ; -I

est/i  
aparten/i

- - - est/as  
- - - aparten/as



1. Kiu vi estas? anst mi; vi, ŝi, li.  
 - Mi estas Takeŝi. virinaj nomoj en ( ).  
 1) Hiroŝi 2) Saburoo 3) Kooiĉi 4) Rikardo 5) Rene  
 6) Ŝigeru 7) Petro (8) Toŝiko (9) Harumi (10) Sanae  
 (11) Kejko (12) Miĉiko (13) Majumi (14) Juri (15) Priskila

2. Kio vi estas? anst mi; vi, ŝi, li.  
 - Mi estas studentino.  
 1) oficisto 2) dommastrino 3) instruisto 4) aviadisto  
 5) laboristo 6) flegistino 7) kuracisto 8) komercisto

3. Interparolo.

A : Bonan tagon!

B : Bonan tagon!

A : Kiu vi estas?

B : Mi estas Takeŝi.

lŭ n-ro 1.

Kaj kiu vi estas?

A : Mi estas Hiroŝi.

lŭ n-ro 1.

Kio vi estas?

B : Mi estas studento.

lŭ n-ro 2.

Kaj kio vi estas?

A : Mi estas oficisto.

lŭ n-ro 2.

B : Mi estas studento,

kaj vi estas oficisto.

A : Nu, bonan tagon!

B : Bonan tagon! Ĝis revido!

4. Sin prezentu laŭ la supre montrita maniero.

5. Ekzercu la interparolon sen teksto.







|   |   |  |   |
|---|---|--|---|
|  |  |  |  |
| pomo  | banano  | oranĝo   | kaŝtano   |
|  |  |  |  |
| vinbero   | aŭto  | domo   | tajpilo   |

6. Jen estas pomo!

Jen estas Petro!

7. Jen venas Takeŝi!

8. Al kiu apartenas la pomo?

- La pomo apartenas al mi.

9. La pomo estas mia pomo.

Ĝi estas mia pomo.

Ĝi apartenas al mi.

lŭ n-roj 1,2, k bldj.

same kiel n-ro 6.

lŭ bldj,anst mi;vi,li,ŝi

same kiel n-ro 8

|     |     |     |     |     |
|-----|-----|-----|-----|-----|
| 1   | 2   | 3   |     |     |
| mi  | vi  | li  | ŝi  | ĝi  |
| mia | via | lia | ŝia | ĝia |



XXXXXXXXXXXX L E C I O N O 2 ( D U ) XXXXXXXXXXXXXXX

Takeŝi : Haloo, Akiko!  
 Akiko : Ha, Takeŝi!?  
 Takeŝi : Jes, mi!  
 Akiko : Ĉu vi havas aŭton?  
           Ĉu ĝi estas via aŭto?  
 Takeŝi : Jes, ĉi tiu estas mia aŭto.  
           Mi aĉetis ĝin antaŭ 3 (tri) monatoj.  
 Akiko : Vi aĉetis aŭton antaŭ 3 (tri) monatoj,  
           kaj mi aĉetis belan biciklon antaŭ 5 (kvin) monatoj.  
 Johano : Ĉu vere? Ankaŭ mi aĉetis biciklon antaŭ 5 monatoj.  
 Akiko : Ho, ĉu vi estis en la aŭto?  
 Johano : Jes, mi estis.  
 Akiko : Ĉu aŭton vi aĉetis?  
 Johano : Ne, ne, biciklon mi aĉetis!  
 Takeŝi : Vi ambaŭ aĉetis biciklojn.  
 Johano : Jes, ni aĉetis biciklojn.  
 Takeŝi : Akiko, ĉu vi ne iras al kamparo kun ni?  
 Akiko : Kun ĝojo! En printempo floras multaj belaj floroj,  
           kaj birdoj kantas belajn kantojn.  
           Riveretoj fluas en kampoj.  
           Mi plej ŝatas printempon!  
 Takeŝi : Ankaŭ mi, Akiko!  
           Nu, ni iru.

XXXXXXXXXXXX V O R T A R O XXXXXXXXXXXXXXX

jes    ĉu    ĉi tiu    aĉeti    tri    monato    bela    antaŭ  
 kvin   Ĉu vere?   en    ne    ambaŭ    ni    biciklo    iri  
 al    kamp/ar/o   kun   ĝojo   printempo   flori   multa  
 birdo   kanti   river/et/o   flui   kampo   plej   ŝati

XXXXXXXXXXXX N U M E R A L O XXXXXXXXXXXXXXX

1 (unu)    2 (du)    3 (tri)    4 (kvar)    5 (kvin)



|         |         |       |       |
|---------|---------|-------|-------|
|         |         |       |       |
| biciklo | kamparo | floro | birdo |

|       |        |     |      |
|-------|--------|-----|------|
|       |        |     |      |
| kanti | rivero | iri | veni |

|           |        |        |        |
|-----------|--------|--------|--------|
|           |        |        |        |
| printempo | somero | aŭtuno | vintro |

hierau

hodiau

morgau

- GRAMATIKO -

( 1 ) -A

bel/a      blu/a      mult/a

( 2 ) -N

kant/o/n      bel/a/j/n      flor/o/j/n

( 3 ) -J

bicikl/o/j      bel/a/j      kant/o/j      blu/a/j/n      aŭt/o/j/n

( 4 ) -IS

est/i      ---      est/as      ---      est/is  
hav/i      ---      hav/as      ---      hav/is  
kant/i      ---      kant/as      ---      kant/is

( 5 ) -ET-

river/o      - - -      river/et/o  
bicikl/o      - - -      bicikl/et/o  
flu/i      - - -      flu/et/i



1. Ĉu vi estas Akiko?

anst vi; mi, li, ŝi.

( Jes, mi estas Akiko.  
Ne, mi ne estas Akiko.

- 1) Aharon (4) Ĥana :7: kuracisto :10: laboristo  
2) Moŝe (5) Dvora :8: flegistino :11: studento  
3) Abraham (6) Katarino :9: instruisto :12: komercisto

2. Ĉu vi ne estas Akiko?

lŭ 1.

( Jes, mi estas Akiko.  
Ne, mi ne estas Akiko.

3. Ĉu vi havas pomon?

( Jes, mi havas pomon.  
Ne, mi ne havas pomon.

- 1) banano 4) tajpilo 7) floro 10) kulero 13) persiko  
2) oranĝo 5) biciklo 8) alumeto 11) forko 14) cigaredo  
3) domo 6) aŭto 9) libro 12) ombrelo 15) krajono

|         |
|---------|
|         |
| alumeto |

|       |
|-------|
|       |
| libro |

|        |
|--------|
|        |
| kulero |

|       |
|-------|
|       |
| forko |

|         |
|---------|
|         |
| ombrelo |

|         |
|---------|
|         |
| persiko |

|          |
|----------|
|          |
| cigaredo |

|         |
|---------|
|         |
| krajono |

4. Ĉu vi havas pomojn?

lŭ 3.

( Jes, mi havas pomojn.  
Ne, mi ne havas pomojn.

5. Kion vi havas?

lŭ 3.

( Mi havas librojn.  
Mi havas libron.

6. Ĉu vi ŝatas bananon?

Jes, ... Ne, ...  
oranĝo persiko kaŝtano vinbero  
floro cigaredo printempo





7. Ĉu vi aĉetas pomon? lŭ 6.  
Ĉu vi aĉetis pomon?  
Jes, ... Ne, ...
8. Ĉu vi estis en Kanazaŭa hieraŭ?  
Jes, ... Ne, ...  
1) Kumamoto 2) Tokio 3) Parizo 4) Kioto 5) Londono  
6) Aomori 7) Vaŝingtono 8) Aiĉi 9) Napolo 10) Saga
9. Jen estas bela floro. lŭ 3.  
Jen estas belaj floroj.
10. La pomo estas bona. lŭ 3.  
La pomoj estas bonaj.
11. Tiu ĉi (Ĉi tiu) estas blua libro. lŭ 3.  
Tiuĵ ĉi (Ĉi tiuĵ) estas bluaj libroj.
12. Ĉu ĉi tiu pomo estas ruĝa?  
Ĉu ĉi tiuĵ pomoj estas ruĝaj?  
Jes, ... Ne, ...
13. Ĉu vi havas verdajn librojn? lŭ 3.  
Jes, mi havas verdajn librojn.  
Jes, mi havas multajn verdajn librojn.  
Ne, mi ne havas verdajn librojn.





XXXXXXXXXXXX L E C I O N O 3 ( T R I ) XXXXXXXXXXXXXXX

Johano : Bonan nokton, fraŭlino!  
 Akiko : Ha, Johano! Bonan nokton.  
 Johano : Kiel vi fartas nun?  
 Akiko : Mi fartas tre bone, dankon.  
 Kaj vi?  
 Johano : Ankaŭ mi fartas tre bone, dankon.  
 Akiko : Vi ŝajnas gaja.  
 Kio okazis al vi?  
 Johano : Mi amuziĝis koncerton.  
 Akiko : Tre bone!  
 Kion vi aŭskultis?  
 Johano : Mi aŭskultis la naŭan simfonion de Antonin DVORAK\*.  
 Akiko : Ĉu ĝi ne estas „El la Nova Mondo\*\*“?  
 Johano : Jes, vi pravas.  
 Akiko : Kiam li, DVORAK, komponis tiun ĉi simfonion?  
 Johano : Li komponis ĝin en la jaro 1893(mil okcent naŭdek tri),  
 en Usono.  
 Akiko : Kiam li naskiĝis?  
 Johano : Li naskiĝis en 1841 (mil okcent kvardek unu),  
 kaj mortis en 1904 (mil naŭcent kvar).  
 Akiko : Kaj kie li naskiĝis?  
 Johano : Li naskiĝis en Ĉeĥoslovakujo.  
 Akiko : Ĉu li ne naskiĝis en Pollando?  
 Johano : Ne, en Ĉeĥoslovakujo!  
 ŜOPAN\*\*\* naskiĝis en Pollando.

\* Antonín Dvořák

\*\* Z Nového Světa

\*\*\* Chopin

XXXXXXXXXXXX V O R T A R O XXXXXXXXXXXXXXX

nokto fraŭlino kiel farti nun tre danko ŝajni gaja  
 kio okazi amuz/iĝ/i koncerto aŭskulti simfonio  
 el nova mondo pravi kiam komponi Usono  
 nask/iĝ/i mortis kie Ĉeĥoslovak/uj/o Pol/lando

XXXXXXXXXXXXXXXX NUMERALO XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

6 (ses), 7 (sep), 8 (ok), 9 (naŭ), 10 (dek), 100 (cent), 1000 (mil)

## おわりに

---

これでこのテキストは終わりです。あとは手書きの原稿のままですので、割愛いたします。ごらんいただき、ありがとうございました。

2012-04-30 著者